# KATOLIKA SENTO

# '71



SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLIKA SENTO** **50ª jaro**

nº **10** - Oktobro 1971

(Bollettino mensile)

## LA POPOLO DE DIO EN LA PLANO PRI LA SAVO (1)

La serĉado de la esprimoj karakterizaj kaj plej gravaj en la instruoj de la lasta Koncilo gvidas nin rekoni facile en la kvalifiko "Popolo de Dio" la preferatan titolon, per kiu estas difinita la Eklezio. La Eklezio estas la Popolo de Dio. Ne estas ĉi tiu la nura nomo, kiu apartenas al ĉi tiu Instituto mistera kaj kompleksa, kiu estas la Eklezio.

Ni ĉiuj certe memoras almenaŭ kelkajn el multaj titoloj, per kiuj estas nomata en la lingvo biblia kaj teologia la Eklezio. Meritas memorigi iujn el ili por pli bone kompreni la gravecon kaj la signifon de tiu pri Popolo de Dio, sur kiu ni haltigas nun nian atenton. La Eklezio estas en Kristo "sakramento, signo, rimedo", pere de kiu la homoj povas komuniki intime kaj por propra savado kun Dio, kaj povas konstitui inter si societon, eĉ pli multe komunumon. Tion ni jam alian fojon memorigis. La Eklezio estas "la ĝermo kaj la komenco"de la Regno de Kristo kaj de Dio. Ĝi estas la ŝafejo, de kiu Kristo estas paŝtisto. Ĝi estas la domo, la templo, la familio de Dio. Ĝi estas la mesia Jerusalemo, la urbo de Dio. Ĝi estas la fianĉino de Kristo, tio estas la homaro kunigita al Kristo per ligilo de amo supera kaj vivema. Ĝi estas la kolono kaj la fundamento de vero. Ĝi estas la kolono kaj fundamento de vero. Ĝi estas precipe

---

(1) Alparolado de la Sankta Patro en la ĝenerala aŭdienco de la 1-a de septembro.

la mistika Korpo, de kiu Kristo estas la Kapo kaj de ki u ni estas la membroj malsame strukturitaj de unika Spirito (I Kor.12:12 s.; Kol.1:18; Ef.1:22-23; 4:15-16); k.t.p. Ĉiu el ĉi tiuj titoloj donas motivon por profundaj kaj ekzaltantaj meditadoj.

Sed ni haltu ĉe tiu elektita de la Koncilo. Tre bela paĝo de la dogma Konstitucio pri la Eklezio, la "Lumen Gentium" (n.9), tiel nin instruas:

"En ĉiu tempo kaj en ĉiu nacio estas bone akceptata de Dio ĉiu persono, kiu lin timas kaj agas juste (Ag.10, 35). Tamen Dio volis sanktigi kaj savi la homojn ne individue kaj sen iu ligilo inter ili, sed li volis konsistigi el ili popolon, kiu lin rekonu en la vero kaj fidele lin servu. Tial li elektis por si Izraelon, por ke ĝi estu lia popolo, starigis kun ĝi interligon kaj ĝin formis, manifestante malrapide en ĝia historio sin mem kaj siajn planojn kaj sanktigante ĝin por si. Sed ĉio ĉi okazis en preparo kaj figuro de tiu nova kaj perfekta interligo konkludota en Kristo, kaj de tiu pli plena revelacio, kiu estis farota pere de la Vorto mem de Dio iĝinta homo."Jen venos la tempo, vorto de la Sinjoro, kiam mi faros kun Izraelo kaj kun Jehudo interligon novan... Mi metos mian leĝon en ilian koron kaj en ilia menso mi ĝin stampos; ili havos min kiel Dion, kaj mi havos ilin kiel mian popolon... Ili ĉiuj, malgranduloj kaj granduloj, min konos (Jer. 31:31-34)". Ĉi tiun novan interligon starigis Kristo; ĝi estas la nova interligo en lia sango(I.Kor. 11,25), vokante la homojn el la Judoj kaj el ne-Judoj, por ke ili fandiĝu en unu tuton ne laŭ la karno, sed en la spirito, kaj konsistigu la novan popolon de Dio".

Belega sintezo historia kaj teologia pri la rilatoj inter Dio kaj la homaro, laŭ la Revelacio.

Multaj atribuis grandan gravecon doktrinan kaj praktikan al la antaŭeco, kiun la "Lumen Gentium" donis al la pritraktado de la dua ĉapitro, pri la Popolo de Dio,

kompare kun tiu de la tria ĉapitro, pri la hierarkia kon stitucio de la Eklezio, kvazaŭ el tio sekvus de nun e-senca ŝanĝo en la konsisto de la Eklezio mem, ŝanĝo, kiu devigu ĝin reformi sian konstitucian ordon, kian Kri sto starigis kaj la tradicio interpretis kaj fiksis; ŝanĝo malavantaĝa precipe por la dogmaj doktrinoj de la Koncilo Tridentina kaj de la Vatikana Unua, kaj de la kutima instruado teologia kaj katekisma, kaj avantaĝa por la demokratiaj ideologioj de nia tempo. Sed tiel ne estas. La antaŭeco de la studado, pri kiu ni parolas, havas grandan gravecon pro la vidado vasta kaj organa, kiun ĝi devigas nin kontempli: la homa realo, komuna al ĉiuj, el kiu estas farita la Korpo mistika kaj socia de la Eklezio, kaj la fina celo de la Eklezio mem, nome la savo de la homaro, de la Popolo, estas metitaj en unuan lokon, "priores in intentione"; sed la kaŭzo aganta, nome la hierarkia mandato, kun la koncernaj povoj generantaj la Popolon de Dio, donita de Kristo al la apostoloj, konservas sian nepre necesan valoron, kiel estas dirite en la citita tria ĉapitro, kun ĝiaj specifaj prerogativoj: "prior in executione". Ne sub ĉi tiu aspekto pseŭdo-antagonisma inter Popolo kaj Hierarkio ni devas studi kaj aprezi la titolon "Popolo de Dio" rekonitan al la Eklezio tuta, Fideluloj kaj Episkopoj kaj Papo kune. Egaleco fundamenta (Mat.23:8), destino komuna ĉirkaŭbrakas en la dia penso la homaron; ĝi formas la popolon, al kiu ĉiuj povas aliri. Ĝi estis popolo determinita, kaj laŭ motivoj etnaj kaj normoj religiaj, tio estas laŭ la antikva interligo, la antikva testamento, popolo privilegiita kaj ekskluziva; sed kun la veno de la Mesio, de Kristo fondinto de "nova kaj eterna interligo", aperis nova popolo, ne difinita per la sango kaj per la tero, sed, kiel skribas apostolo Petro en sia unua letero, "raso elektita, pastraro reĝa, gento sankta, popolo akirita", pere de la elaĉeto de Kristo doni

ta al la tuta homaro, al Popolo el filoj de Dio(Jo.1:12), al vi ĉiuj, "vokitaj al lia mirinda lumo, vi, kiuj iam ne estis popolo, sed nun estas popolo de Dio"(I Pet.2: 9-10). Ĉi tiu estas la religia projekto, la plano pri la savo vera, efika, plano eliĝinta el la mizerikordo de Dio, al la eterna amo. La Koncilo ĝin prezentas al ni mirinde en ĝia realo historia kaj esenca, dum la jarcentoj kaj plue.

Ni nun atentu. Ĉi tiu dia plano, intence kaj potenciale universala, tio estas katolika, konservas, tamen, fakte, laŭ neesploreblaj pensoj de Dio, (Mat.24:40), kaj omaĝe al la netuŝebla kaj fatala libereco de la homo (Rom.10:16; Joh.12:37) linion disigan, la kredon, kun ĉio, kion ĝi implicas en la ordo homa kaj spirita (Mar. 16:16; Hebr.11:6), kaj tiu linio signas la aspekton de la popolo de Dio; fakte, ĉi-lasta estas la komunumo de la kredantoj, de tiuj, kiuj akceptis la evangelion, la bonan novaĵon, kaj tial eniris en novan, nedireblan rilaton kun la vivanta Dio, en novan, supernaturan interligon, kiun ni nomas la Nova Testamento (I Kor.1:21).

La aparteno al la Popolo de Dio, ni pripensu bone, akiras grandegan kaj decidan gravecon; ĝi estas la komenco kaj la garantiaĵo de la savo. Grandegan gravecon ĝi akiras, ĉar tiu aparteno dependas de kompleksa mistero de graco, de korfavoro, de amo fare de Dio, kaj de homa libereco fare de ni, ĉar tiu aparteno eniĝas en la dramon de nia eterna persona destino (Joh.3: 18; Apok.7:3;9:14;14:1), kaj ĉar kun ĝi estas kunligitaj aliaj grandegaj problemoj, kiaj tiu misia (Ad Gentes, n.2-5) kaj tiu ekumena. Se la Popolo de Dio estas la Eklezio de Kristo, la aparteno al la Eklezio de Kristo fariĝas afero ĉefa.

Kiu videtas en la ideo kaj en la realo de Popolo la plej altan esprimon de la homa vivo kolektiva, sed haltas vole kaj radikale je nivelo laika kaj sekulara, tiu

rezignas pri la levado de ĉi tiu nia amaso da mortemuloj, ĉiam nekontentaj, al la supera nivelo de Popolo de Dio, de Popolo mesia, levita al la estanta kaj estonta destino de Eklezio, Korpo de Kristo, reviviĝinta kaj reviviganta: ĝi estas risko danĝera, kiu povas konduki al gravaj eraroj.

Kaj kiu pensas povi sin gardi laŭplace kristano, forlasante la medion starigitan de la Eklezio videbla kaj hierarkia, aŭ imagas resti aliĝanta al la penso de Kristo modlante por si Eklezion konceptitan laŭ propra plaĉo, tiu estas ekstervoje, kaj iluzias sin mem. Li kompromitas kaj verŝajne rompas, kaj rompigas al aliaj, la veran komunecon kun la Popolo de Dio, kaj tiel perdas la garantiaĵon de ĝiaj promesoj.

Oni devus ĉi tie memorigi la antikvan sentencon: "Ekster la Eklezio ne estas savo"; sed ne estas nun la momento por klarigi, kiel ĝi devas esti komprenata. Dio povas savi ĉiun ajn, kiel li volas, kaj ni konas, kiom estas granda lia scio kaj lia korfavoro: sed estas la fakto, ke revelaciante sian amon, li starigis Kriston kun lia Eklezio kiel pasoponton, devigan por ni, inter nia malfeliĉa sorto kaj lia savo kaj lia beateco.

Tial la konscio pri la aparteno al la Popolo de Dio, al la Eklezio, kun fila aliĝo en la kredo, en la karitato, en la kumunumo strukturita kaj videbla, kia ĝi estas, devus esti ĉiam de ni nutrata kaj ekzamenata kun humila kaj sincera kontrolo; kaj ĝi devus konsistigi la spiritan fonton de sekureco kaj ĝojo, propran de la bona Popolo de Dio, kristana kaj katolika; kaj meti senĉese en nian koron la himnon de la pilgrimanta Eklezio: "Kiel estas ĉarmaj viaj loĝejoj, ho Sinjoro, Dio de la legiaroj! Mia animo anhelas kaj sopiras al la kortoj de la Sinjoro! Mia koro kaj miaj sensoj ĝojegas al la vivanta Dio!". Tiel parolis la Psalmisto (Ps.83); tiel ni kaj vi ĉiuj kun nia Apostola Beno.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO

n° 98

IL 3 OTTOBRE, PRIMA DOMENICA DEL MESE, SI RIAPRE IL NOSTRO CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO (CECR) CON la Messa domenicale in Esperanto delle ore 10,30 in S.Maria Maggiore e con l'adunanza che subito dopo la segue, presso l'Istituto Orientale della stessa piazza, n°7. Tutti gli Esperantisti Romani sono cordialmente invitati.

ABONOJ: Jam validas la abonoj por la nova jaro. Sed tiuj, kiuj ne pagis ankoraŭ la ricevitan kolekton de la 1971 ne forgesu pagi ankaŭ tiun, ni petas!

LA 11-an DE SEPTEMBRO NASKIĜIS ANNALISA, alportante en la familion Puracchio, kun la dia beno la plej puran ĝojon. Al la feliĉa patrino Elizabeta, kiu multe helpas pri nia bulteno, kaj al Pasqualino, ŝia edzo, niajn plej korajn gratulojn, kaj ĉiujn niajn bondezirojn al la eta Annalisa.

PROFESORO ALVES DE MOURA, aŭtoro de "Konkero de la spaco", pri kiu jam aperis la dua interesega scienca volumo en la portugala lingvo, tre riĉa je bildoj ankaŭ koloraj kaj grafikaĵoj, estas pasia esperantisto. Per sinsekvaj artikoloj li aktive propagandas en la portugala porlerneja revuo "Revista de ensino liceal", la internacian lingvon. Jen liaj versoj dediĉitaj al:

## ZAMENHOF

Estas homoj sur Tero honorindaj
kiuj por ĉiam vivos memorataj
de ĉiuj geamikoj, kaj amataj,
pro siaj laboraĵoj meritindaj.

Tiuj saĝaj lertuloj estis indaj
Fariĝi de la homoj respektataj;
dum la viv' ili estis estimataj,
post la mort' ili estos memorindaj.

Zamenhof, jen saĝulo defendanta
la pacon kaj la bonon de l'homaro,
la kreinto de lingvo paciganta.

Al li estas dankema la ularo,
Pro lia mirlaboro, parolanta
al la koro de ni, kamaradaro.

Septembro 1971 ALVES DE MOURA

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l'eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

LA 13-an DE SEPTEMBRO APERIS la Apostola Konstitucio pri la reformo de la Konfirma sakramento, laŭ la decidoj de la Dua Vatikana Koncilo. La Ap.Konst., kiu titoliĝas el la unuaj vortoj: "Divinae consortium naturae" (Partopreno en la dia naturo), estis eldonita, kiel ĉiuj aliaj dokumentoj rilatantaj la liturgion, de la Kongregacio por la dia kulto. Ĉefa celo de la eklezio en ĉi tiu renoviĝo estis, ke la rito esprimu plej klare la signifon de la sakramento kaj ke la ricevanto konsciu pli bone la gracojn ricevitajn kaj la novajn devojn. La plej grava novaĵo rilatis la "formon", t.e. la sakramentan formulon, kio estas reveno al la plej antikva bizanta ri

to: "Accipe signaculum doni Spiritus Sankti" (Ricevu la signon de la donaco de la Sankta Spirito). Aliaj novaĵoj rilatas la malaperigon de la simbola vangofrapo, kiu memorigis, ke ekde nun la konfirmito devas kapabli elteni suferojn. Pri la administranto restos ankoraŭ kiel ordinara la episkopo; sed dum kuncelebrado ankaŭ la pastroj povos kune kun la episkopo doni la sakramenton. Oni jam sciis ke, anstataŭ la krismo, t.e. la oliva oleo kiu, miksita kun orienta balzamo necesis ĝis nun, ĉiu ajn vegetala oleo kun ordinara parfumo povos esti ekde nun uzita, laŭ la dispozicioj de episkopaj konferencoj, kiuj ankaŭ decidos pri la minimuma aĝo postulita. La nova ordo devigos ĉie ekde la komenco de 1973.

GRANDA EVENTO POR LA EKLEZIO estas la Roma Sinodo, por kiu ĉiuj katolikoj estas invitataj al preĝado. Niaflanke ni invitas al tio la katolikajn esperantistojn. La Sinodo komenciĝos la 30-an de septembro kaj daŭros verŝajne la tutan oktobran monaton. Du ĉefaj estas la temoj pritraktendaj: pastreca vivo, kaj justeco en la mondo. La Sinodo estas institucio kreita de la freŝdata koncilo; kunveno, kiu ripetiĝas ĉiun duan jaron, kolektanta reprezentantojn de la tutmonda episkoparo: preskaŭ 200. La plej parto el ili estas elektita per la episkopa konferenco de ĉiu lando de la tero; krome partoprenas en ĝi prezidantoj de la administraj fakoj de la eklezio, spertistoj, delegitoj de religiuloj, kelkaj sacerdotoj proponitaj de la episkopaj konferencoj, kaj kelkaj laikoj, inter kiuj du virinoj.

FUNDAMENTA TASKO DE LA EKLEZIO estas evangelizado, la anonco de la dia mesaĝo al la popoloj spirite kaj geografie pli malproksimaj. Por la pli ol 3 miliardoj kaj duono da homoj, kiuj vivas sur nia planedo, necesus almenaŭ tri milionoj kaj duono da sacerdotoj; male ili estas nur 400.000 : malpli ol sepono! Kial la sa-

cerdotaj kaj misiistaj vokiĝoj estas malmultaj? Inter la diversaj kaŭzoj estas sendube la malabundo aŭ manko de kredo ĉe multaj familioj, inkluzive junulojn. Necesas preĝi Dion, ke li sendu laboristojn en sian grenkampon!

LA KONGREGACIO POR EVANGELIZADO devas zorgi por subteni en misilandoj, krom misiistoj, fratinoj kaj diversaj iniciatoj, ankaŭ porkatekistajn entreprenojn kaj porpastrajn seminariojn. En la Afrikaj misilandoj dependaj de la Roma "Propaganda Fide", troviĝas 70.000 katekistoj; 60.000 en Azio, el kiuj 50.000 en Hindujo, kaj 3.500 en Oceanio. En 1970 la petoj por helpo al la katekista entrepreno estis la duoblo de la antaŭa jaro: 231 petoj el Afriko, 161 el Azio, 17 el Oceanio, 30 el la Latina Ameriko. Sed la fonduso disponebla: 3.300.000 da dolaroj, sufiĉis nur por malpli ol la duono. Necesas fakte multaj elspezoj pro studokursoj, lernejoj kaj loĝejoj, por la laboro, ktp. En simila situacio troviĝas la entrepreno por la misiaj seminarioj, kiuj zorgas por 3.811 lernantoj en la elementaj klasoj, 22.853 en la mezgradaj, 17.075 en la gimnaziaj, 5.000 studentoj en la filozofiaj kursoj kaj 3.265 en la teologiaj. En 1970 sacerdotiĝis 560 junuloj en la diversaj misioj, krom 52 en la instituto S. Petro Apostolo en Romo. Ĉi tiuj nombroj ne rilatas la teritoriojn de Aŭstralio kaj Novzelando, kvankam dependaj de la Kongregacio por Evangelizado, kaj la religiajn seminariojn.

LA 3-an DE SEPTEMBRO LA PAPO forlasis sian someran restadejon por viziti du klaŭzurajn monakinejojn kaj parokon de Albano. La unua religia domo de li vizitita apartenas al la Bazilianaj fratinoj ekde 1845, kiam kelkaj monakinoj sukcesis eskapi el la Litvana persekutado. La fratinoj salutis la papon per ukrajna kanto. Kaj la papo havis oportunan temon por sia alparolado al ili, el la fakto, ke ili sekvas la spiritan vivmanieron de S. Bazilio

la Granda, kiu havis notindan influon en la orienta- tra dicio-, kvankam la fondo de la ordeno devenas de la po la martiro S. Josafato. Tiel la papo parolis pri la ekle zia aspiro, ke katolikoj kaj ortodoksuloj sukcesu reveni al unueco de kredo kaj de amo, respektante tamen la diversecon de la ritoj kaj de la spirita sento. La papo memorigis ankaŭ , ke la relikvoj de S. Josafato, unue konfiditaj de li mem, kiam li estis Ŝtata sekretario, al la franciskaninoj, poste, zorge de kard. Slipyi, estis donitaj al la baziliko S.Petro. Parolante al la dua monakinejo, kie vivas klaraninoj, la papo aldonis novajn vortojn pri la neceso de la penta kaj preĝa vivo por la eklezio, kiu volas esti malriĉa, preĝanta kaj pentofara. Fine, parolante al la parokanoj de la preĝejo "Senmakula Koro de Maria", la papo diris, ke tiu preĝejo, de mallonge inaŭgurita, memorigas, ke tio ne signifas, ke oni jam konstruis la eklezion, ĉar ĉi tio apartenas al la frateco, al la komunuma spirito de ĉiuj parokanoj, unu iĝe kun la parokestro, kaj per li kun la eklezia jerar - kio.

LA "LEGIO DE MARIA" (v. nian bult. n°4,p.16) celebras ĉijare la kvindekan datrevenon de sia ekzisto. En tiu okazo la papo sendis leteron, subskribitan de la Ŝta ta sekretario, kard. Villot, memorigante la kristanan ateston ĉiam donitan fare de la legianoj, kelkfoje ĝis he roeco. "La legio de Maria - skribas la papo - enkondu kis ĉiam novajn kaj malfacilajn iniciatojn, kaj ĝia nedirebla fido al la Maria potenco, faris ĉi tiujn entreprenojn eblaj ankaŭ al la simpla kredanto. Preĝado kaj spi rita formiĝo konsistigas la sekreton de via fekundeco".

KATOLIKAJ PORINFORMAJ AGENTEJOJ, la aŭstria "Kathpress", la "KIPA", la nederlanda "KNP" kaj la germana "KNA" starigos laŭjuran unuiĝon en Romo. La nova redakcia grupo celas fortigi la kapablecon de pe-

netrado de ĉiu agentejo kaj vastigi ilian kampon, intensigante ankaŭ kontaktojn de la nova grupo kun agentejoj de aliaj landoj, kiel la belga "CIP", la hungara "Magyar Kurier" kaj la Afrika "DIA". La anonco de la starigo de la nova organo, decidita de la gvidantoj de la unuopaj agentejoj, estis donita en Vieno dum la ĵus pasintaj tagoj.

ALVOKO POR MALKAŜI kaj forigi la fundamentajn kaŭzojn de perforto, estis adresita al ĉiuj kanadaj episkopoj el komisiono de la katolika konferenco de Kanado. "La tute simpla malaprobo de la perfortaj simptomoj ne sufiĉas"- deklaras la episkopoj en la mesaĝo, titolita "La pozicio de la kristano antaŭ perforto". Promesante kunlaboron de la nacia fako por Socia Agado, la episkopoj sin adresas al la diocezaj konsilioj, al la apostolaj kaj sociaj movadoj, al la parokaj sesioj, al la etnaj kaj komunumaj ekumenaj grupoj, por priserĉi pozitivajn sed pacajn respondojn al perfortoj kaj maljustecoj.

LA "NEW ATLANTIC SCHOOL of theology" malfermos baldaŭ lernejon por formado de pastraj vokiĝoj kaj por teologia instruado al laikoj. Ĝi naskiĝis sub la aŭspicioj de katolikoj, de anglikanoj kaj de la Unuiĝinta Kanada Eklezio ĉe Halifax, en la Kanada provinco Nova Skotlando. Aliĝas al ĝi la anglikana universitato de "King's college", la katolika episkopa korpuso de Halifax, kaj la teologia instituto "Pipe bill" de la Unuiĝinta Eklezio.

"KATOLIKOJ KAJ METODISTOJ havas komune bazon, kiu estas realaĵo kaj ne fantazia aspiro al ekumena renkontiĝo". Tiel diris kard. Jean Willebrands, prezidanto de la Vatikana sekretariejo por unuiĝo de kristanoj, partoprenante, kiel honora gasto, en la dekdua tutmonda

metodista konferenco celebrita ĉe Denvero, en la Nordamerika ŝtato Kolorado. La episkopo, deklarinte, ke la du kristanaj konfesioj kunhavas komuniajn, kontemplajn, piecajn, fratecajn idealojn, asertis, ke ĉi tiu bazo de kristana spirita sento, multe pli vasta kaj riĉa ol niaj prapatroj opiniis, de longe estis preskaŭ nekonata. Kard. Willebrands citis leteron, freŝdate malkovritan, de John Wesley, fondinto de la metodista eklezio, en kiu li incitis al pli striktaj rilatoj inter sia konfesio kaj la katolika. Komentante tion, la kardinalo konkludis: "Se ĉi tiu komuna heredaĵo estas realo, ĝi estas ankaŭ respondeco por ni. Dio vidas ĝin, kaj li vidas ankaŭ kiamaniere ni ĝin uzas. Li vidas, ke niaj prapatroj estis ja malhelpitaj pro la necerteco de ĝia ekzisto, sed ke ni de ĉi tie devas marŝi antaŭen kaj agadi plie, kaj pli efike ol ili scikapablis".

LA KOMPETENTAJ INSTANCOJ de la plej grandaj amerikaj eklezioj sendis al la plej alta kortumo memorandojn, per kiuj oni invitas la amerikan juĝistaron deklari ne laŭkonstitucia mortkondamnon. La vivo - deklaras la notoj - ne devas dependi de homaj sentencoj, kiuj ĉiam estas eraremaj. La memorandoj estis senditaj okaze de kvar mortkondamnoj.

LA PROGRAMO "SANKTA KORO" lanĉita per la radio fare de la usona pastro Eŭgeno Murphy jam en 1939, atingas hodiaŭ pli ol 5 milionojn da personoj ĉiusemajne pere de ĉirkaŭ 770 radioelsendaj stacioj kaj 200 televidaj en la kvin kontinentoj. Tion deklaris p. Murphy, de pli ol 30 jaroj fervora direktoro de la "preĝa apostolado". Laŭ la origina formulo la programo enhavas tuttagan oferon al la Sankta Koro, preĝon, kaj spiritan maksimon. Malgraŭ sia piema karaktero, kiu ŝajnas kontraŭstari al aliaj kulturaj, komercaj, distraj programoj, la rubriko havas grandan nombron da aŭskultantoj.

LA DEKTRIA PLENA ASEMBLEO de CELAM (Episkopa Latin-amerika konsilio) kun ĉiuj prezidantoj de la 22 episkopaj konferencoj de Sudameriko, fermis siajn laborojn en S. José de Kostariko, pretigante la dokumenton, kiu devos esti prezentata en la Roma Sinodo de ĉi tiu monato. CELAM estis kreita la 2-an de novembro 1955, do longe antaŭ la formuligo pri kolegeco el la Dua Vatikana Koncilo, kun celo kunordigi la agadojn por interkomunio en la eklezioj de la kontinento. La dokumentoj de Medellin, kiujn ĉiuj respondaj kristanoj agnoskas kaj sekvas, akcelas la kristanajn komunumojn alfronti la problemojn de la Latin-amerika socio. La plej urĝa, la problemo de malriĉeco, okazigis, komprenebla, multajn intervenojn el la 70 partoprenantoj. Ankoraŭfoje oni insistis, ke la eklezio devas fakte forlasi kelkajn arkaismajn strukturojn, por laŭvivi la kondiĉojn de la plej granda parto de la kristanaro en la kontinento. En tiu senco tie oni rigardis la temon de la Sinodo: Justeco en la mondo. Pri la alia temo, de la pastreca vivo, la dokumento proponas pli larĝan aliron de edziĝintaj kristanoj al sacerdota rango kaj disiĝon de la du konceptoj: sacerdota kaj celibata stato, kiuj en la eklezia tradicio estas fakte interligitaj.

LA PARTOPRENANTOJ AL LA UNUA interamerika katolika kongreso por la tuteca evoluo, esprimis, ĉe la fermo de la laboroj, firman kondamnon kaj de kapitalismo, kaj de ateista materialismo, kaj de militaj diktaturoj, kiel ankaŭ de ĉiu alia totalismo. Krome ili pledis por tuteca reformo de la leĝaro de ĉiuj landoj pri instruado kaj asisto al la kampara loĝantaro. La kunveno, organizita de la Internacia Federacio de Katolikoj, celis doni konsistigan kontribuaĵon por superi la krizon de la Latin-amerika kontinento, kaŭze de subevoluo, malsato, mizero kaj ekspluatado, kiel pozitivan respondon al la encikliko "Populorum progressio".

INDIANOJ, NEGROJ KAJ MESTIZOJ de la Latina Ameriko jam de kelkaj jardekoj laboras en la oficiala kampo de la katolika eklezio. Nun oni ricevas informon, ke 45 ajmaraj indianoj edziĝintaj sin pretigas ricevi diakonecon. Analoge oni tion celas ĉe diakonaj centroj en Brazilo, Meksikio kaj Gvatemalo. La ajmaraj indianoj, kiuj estas verŝajne pli ol 3 milionoj, vivas sur la altebenaĵoj de Bolivio kaj Peruo. Per tiuj diakonaj centroj oni celas prepari por la indiĝenaj komunumoj aŭtoktonajn katekistojn, kiuj, post taŭga instruperiodo ricevos diakonecon. Kaj oni esperas, ke tio estos, post ekzemplodona servo al la eklezio, la unua paŝo al sacerdota ordino.

LA PERFORTAJ AGADOJ pli kaj pli oftaj en la politika vivo de Argentino, estas severe kondamnitaj en dokumento de la daŭra episkopa komisiono, redaktita antaŭ nelonge fine de kunsido sub direkto de mons. Tortolo. Celante doni sian kontribuaĵon al forigo de la plej gravaj malbonoj, kiuj difektigas la politikan kaj socian vivon de la lando, la episkopoj akcentas la netolereblajn maljustajn situaciojn kaj la persiston de strukturoj kaj malekvilibroj, kiuj forprenas larĝajn popolajn tavolojn el ĉiuj eblaj progresoj rilatantaj la vivon de la lando.

KVAR ARGENTINAJ SACERDOTOJ, aliĝintaj al la movado "Tria mondo" estis liberigitaj en Bonaero, kiu ili estis arestitaj antaŭ monato, sub akuzo de "renversiga propagando".

UNU EL LA PLEJ KONATAJ ELDONEJOJ en Brazilo, la katolika "Vozes" celebris sian 70-jaran datrevenon. Ĝi estis kreita de la franciskanoj en 1901 por publiki katekismajn librojn; sed baldaŭ ĝi celis gravajn psikologiajn kaj sociologiajn verkojn. De diversaj jaroj ĝi publikadas multajn periodaĵojn: "Vozes", revuo pri kulturo kaj aktualeco; "R.E.B." (Brazila Eklezia Revuo) ktp.

LA PLEJ ALTA MILITA BRAZILA tribunalo liberigis la italan misiiston p. Julio Vicini el akuzoj pri renversemo, pro kiuj li estis arestita antaŭ ok monatoj. Tiel la kortumo nuligis sentencon de malsupera tribunalo, kiu kondamnis la sacerdoton al kvar monatoj de karcero, sub akuzo, ke li disdonis renversemajn publikaĵojn al la boristoj. Kaj ankaŭ Jara Spadini, socia helpantino, arestita same kun p. Vicini, estis liberigita.

LA REPREZENTANTOJ DE SEP MIL gereliĝiuloj, kiuj laboras en Ĉilio, dum la ĉijara kuna asembleo, decidis revizii funde la reliĝian vivmanieron en la nuna socio marŝanta al socialismo. Oni aparte proponis: La reliĝiaj komunumoj forlasos laŭgrade ĉiujn posedaĵojn, kiuj ne estas rekte kunligitaj kun la apostolado aŭ aliaj agadoj (domoj, bienoj, akcioj); ĉiu reliĝiulo devas perlabori sian vivon per sia apostolado aŭ per alia pagita aktiveco. Kaj ĉiuj reliĝiuloj de la ĉilia eklezio ĝuos pri la socia protekto la samajn rajtojn de ĉiu enlanda loĝanto.

JE LA UNUA FOJO EN LA HISTORIO de la Minoritoj, oni havas en la Latina Ameriko la ĝeneralan kapitulon. Ĉefaj temoj pristudataj estas: spirita franciskana pieco, misiaj problemoj kaj krizo de vokiĝoj. La kapitulo okazas ĉe Medellin en Kolombio. En la plej alta kunsido de la instituto, kiun estras la ĝenerala superulo p. Konstanteno Koser, 115-a posteulo de S. Francisko , partoprenas ĉirkaŭ 170 reliĝiuloj, venintaj de la 90 ordenaj provincoj, disigitaj en la kvin kontinentoj. La plej nombra delegacio estas la itala, sed ĉeestas en Medellin ankaŭ reliĝiuloj el la Orienta Eŭropo, el la du Amerikoj, el diversaj aziaj landoj, inter kiuj Formozo kaj Vietnamo. La aktuala ĝenerala kapitulo, kiu daŭros dum la tuta monato de septembro, celas nuntempigi la regularon, laŭ la postuloj de la moderna apostolado, la direktivoj de la Koncilo kaj la papaj instrukcioj. La mi-

norita ordeno, kiu celas, sekvante la malriĉecon de Kristo, apostoladon de la evangelia anonco al kredantoj kaj al ne kredantoj, havas hodiaŭ 25 mil reliĝiulojn laborantajn en ĉirkaŭ 2700 domoj.

EPISKOPA KONFERENCO EN LIMO kuniĝis fine de aŭgusto por prepari la partoprenon de la Peruaj episkopoj al la Roma Sinodo, pridiskutante la du ĉefajn proponitajn temojn. Rilate al la pastreca vivo ili rekonfirmis la valoron de la sacerdota celibato; sed petas rajton ordini ankaŭ virojn jam edziĝintajn. La peruaj episkopoj aldonis, ke konstruo de pli justa socio en la latina Ameriko signifas liberigi la kontinentajn popolojn de materia kaj spirita mizero kaj de la premo, kiun ĝi alportas. La evangelio - asertas la peruaj episkopoj - inspiras preferon al malriĉuloj, forlasitoj, subpremitoj. La episkopoj kunvenintaj en Limon insistis, ke la pastro priatentu problemojn kaj aspirojn de siaj membroj kaj aparte de la plej senhelpaj. Pro tio la Perua episkoparo petos de la Sinodo, ke la pastro rajtu, se necese, ekzerci profesion aŭ manlaboron.

LA UNUA KATOLIKA INTERAMERIKA kongreso por la tuteca homa progreso, kunveninta en Karakaso, Venezuelo, denuncis la sociajn kaj ekonomiajn maljustaĵojn pri kiuj estas viktimoj laboristoj kaj kamparanoj, kaj sin deklaris favora al renovigo de la ekonomiaj kaj sociaj strukturoj de la Latin-Amerika kontinento. La kongresanoj rekomendis al kristanoj luktadi por la agrara reformo, kiu ne limiĝu transdoni bienon al kampuloj, sed havigu al ili ankaŭ teknikan kaj financan helpon. Krome la kongreso incitis al la plej granda strebo cele al la progresanta industriiĝa terkulturo kaj al kreo de kooperativoj, kiu servu al la socia liberigo, donante samtempe pli striktan homan solidarecon. Kaj ĝi solene pledis por la respekto de la indiĝena laborista-

ro. Fine oni pritraktis la problemon de forfuĝo de kapitaloj. Pro tio la kongreso lanĉis alvokon al la latinamerikaj kapitalistoj, ke ili ekkonsciu pri la gravaj dangeroj kaŭzitaj al la Sudamerika lando, invitante ilin revenigi al la patrujo siajn kapitalojn, en nomo de justeco.

LA NACIA VENEZUELA KONGRESO aprobis, la unuan fojon en la historio de la lando, financadon al privataj lernejoj. Dank'al tio preskaŭ 200.000 lernantoj, apartenantaj grandparte al malriĉaj familioj, povas daŭrigi studadon. Al ĉi tio kondukis decido de la porinsstrua ministro altigi la pagojn al profesoroj. Sed ĉar el la 858 privataj lernejoj nur triono estus povinta subteni ĉi tiun financan pezon, ĉar temis pri lernejoj por malriĉuloj, kaj ĉar la registaro ne estus povinta sin ŝarĝi pri la instruo de ĉirkaŭ ducent mil lernantoj, dum ĝi ankoraŭ ne kapablas doni tion al aliaj ducent mil sen la unuagrada instruado kaj 672 mil de la mezgrada, tiel ĝi akceptis proponon de p. Januaro Aguirre pri minimuma helpo. Oni kalkulis, ke dum la kosto por la ducent mil privataj lernantoj estus por la ŝtato 163 milionoj da bolivaroj (unu bolivaro egalas al kvarono de dolaro), donante al la religiaj instruaj institutoj la petitan helpon, t.e. 39 milionojn, la ŝtato ŝparas 123 milionojn.

BURUNDO AKIRIS SENDEPENDON el la Belga administracio en 1962. Ĝi komenciĝis laŭ monarkia reĝimo, sed la 28-an de novembro 1966 ĝi estis proklamita respubliko. Burundo estas malgranda ŝtato de la ekvatora Afriko. Ĝiaj loĝantoj estas 3.280.000 personoj, vivantaj en 27.834 kv. km. La plejparto de la popolo estas kristana, kun 1.600.000 animoj; la protestantoj estas 112.000, dum la resto estas animista, kun kelkaj musulmanoj. Bujumbura estas ĝia ĉefurbo. La kristanaj misioj zorgas pri instruado, kiu estas senpaga. La misiistoj laboras ankaŭ en la hospitaloj, leprulejoj, ktp.

Burundo havas ankaŭ du elsendajn radiostaciojn: unu dependas de la registaro; la alia estas "Radio Codac", kiu apartenas al la misioj. Ĉi tiu transsendas en la lingvoj franca, angla, kirunda kaj kisvajla. "Intumwa" estas katolika ĵurnalo en la hirunda, kaj "Kindugu" en Bujumbura, en la kisvajla. Sed ekzistas ankaŭ diversaj aliaj protestantaj kaj katolikaj monataj revuoj.

4258 BAPTOJ AL INFANOJ kaj 4639 al adoltoj estis donitaj la ĵus pasintan jaron en Mozambiko fare de la Minoraj Franciskanoj. La portugala provinco de la ordeno, kiel oni legas en raporto diskonigita antaŭ kelkaj tagoj, laboras en Mozambiko per 92 misiistoj: 60 sacerdotoj, el kiuj 5 aŭtoktonaj, kaj 32 kooperantaj fratoj, kiuj zorgas pri 34 misiaj parokoj, tri porpastraj kolegioj, novicejo kaj porinstruista lernejo. La loĝantaro komisiita al la franciskanoj nombras preskaŭ 1.200.000 animojn, el kiuj 305.000 estas katolikaj, 33.000 katekumenoj kaj 862.000 ne katolikoj. En la kuracejoj de la 34 franciskanaj misioj estis flegataj pasintjare 67 mil malsanuloj, kaj 1059 virinoj naskis infanojn kun higienaj kondiĉoj kaj taŭga asisto. En la 3 franciskanaj kadukulejoj estas asistitaj 43 maljunuloj, dum 903 infanoj trovis rifuĝon en la 27 orfejoj direktitaj de la ordeno. Grava entrepreno de la Minoritoj en Mozambiko estas krome la radielsenda stacio "Radio Pax", je servo de la eklezio kaj de la Orienta Afriko, kies programoj povas esti aŭskultataj ankaŭ en la Suda Afriko, en Rodezio kaj Malavio.

LA HISTORIO DE LA VIETNAMA eklezio fieras pro siaj gloraj memoraĵoj: inter la 1625-a kaj la 1888-a martiriĝis preskaŭ 150.000 kristanoj, el kiuj 117 estis beatigitaj. Nun la katolikoj de la Suda Vietnamo reprezentas nur la 10 procentojn de la tuta loĝantaro (1.782.000 el 17.414.000 loĝantoj). Sed sacerdotaj vokiĝoj ne man

kas. Ĉar 1913 estas la lokaj sacerdotoj (1587 diocezaj kaj 366 reliĝiuloj), 6189 fratinoj, 1074 reliĝiuloj, 3576 katekistoj, 808 pli grandaj kaj 3641 pli junaj seminarianoj. Ĉi tio sugestis de longe projekton fondi vietnaman misian instituton; sed oni devis atendi ĝis ĉi tiu jaro por ricevi la unuaniman aprobon de la episkopa konferenco.

292 ESTIS LA LIBROJ PRI RELIGIA TEMO presitaj en la orienta Germanujo dum 1970, laŭ informo de la Statistika Instituto. La nombro egalas al kvin procentoj de ĉiuj publikaĵoj en la lando. La 292 libroj atingis kune eldonkvanton de 4.300.000 ekzempleroj.

LA HISPANA EKLEZIO HAVAS, inter la Eŭropaj landoj, la plej grandan nombron da sacerdotoj laborantaj en la Latina Ameriko. Fine de aprilo ili estis 661, disigitaj en 151 diocezoj de Argentino, Brazilo, Venezuelo kaj Ĉilio. La italaj sacerdotoj estas 330, en 94 diocezoj; la francaj 186; 156 la belgaj kaj 30 la svisaj.

LA POLA KATOLIKA SEMAJNA revuo "Tygodnik Powszechny" raportas el la "Jarlibro pri sociologio de vilaĝo 1968-a" ĵus aperinta, kelkajn surprizajn indikojn eltiritajn de enketo pri disvastigo de la religio inter la 1958-1964, fare de la Instituto de la Pola Radio, laŭ opini-sondado. Tiu enketo konfirmis, kiel estis antaŭvidite, ke la kampara loĝantaro estas pli religia ol la urba. En la vilaĝoj sin deklaris kredanta la 83,8 procentoj de la loĝantoj, dum en la urboj oni trovis 75,6 p.c. Sed tri rezultoj ĉefe surprizis, ĉar ili estis kontraŭaj al ĉiu kalkulo: 1) inter 1960 kaj 1965 la proporcio de la katolikoj el la kamparaj regionoj, kiuj sin deklaris "fidelaj observantoj" ne malpliiĝis, laŭ la ĝenerala opinio, ke socialismo splitigas katolikismon kaj malkristanigas la kamparon; male, tiu proporcio kreskis de 46,7 al 61,6 p.c. 2) Neniu junulo inter 18 kaj 24 jaroj sin

deklaris ne kredanta; spite de la kutima opinio, ke lai kiĝo disvastiĝas precipe inter la junularo. 3) La nombro de la observantaj katolikoj inter la kamparaj kleru loj ne malpliiĝis (laŭ la slogano, ke religiemo estas kon traŭproporcia al la instrugrado), eĉ ĝi kreskis de 12,9 al 21,4 p.c. Tiel la citita Jarlibro konstatis maltrankvi le, ke en la kamparoj ne estis eble elimini klasdiferencojn, sur kiuj sin apogas ĉiu religia sento.

TRE RELIEFIGITA EN ĈIUJ okcidentaj ĵurnaloj estis la vojaĝo al Sovetunio kaj al Ekstrema Oriento de p.Ar rupe, ĝenerala superulo de la Societo de Jesuo. Invitita de ortodoksaj ekleziaj aŭtoritatoj, post mallonga hal to en Bruselo, li alvenis al Moskvo, kie akceptis lin ne nur ortodoksaj episkopoj, sed ankaŭ registara reprezentanto. En la soveta ĉefurbo li restis kvin tagojn; li ĉeestis solenan ortodoksan liturgion honore al la Ĉielenprenita Maria; li vizitis la novan patriarkon Pomene en Zagarsk, kun kiu li parolis dum triono da horo. Kvankam li ĉiam deklaris, ke li venis nur kiel reprezen tanto de sia ordeno, oni ne mankis rimarki la ekumenan karakteron de lia vizito. La 1-an de septembro li forla sis Rusujon cele al Hindonezio por daŭrigi la viziton al sia ordeno; li iros ankaŭ al la Karolinaj insuloj, Hong kongo, kaj fine al Japanujo, kie li estis misiisto dum multaj jaroj antaŭ sia elekto al la plej alta jesuita posteno. La longa vojaĝo de p. Arrupe daŭros ĝis la 23-a de septembro.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZO: £. 1.000 (Us.dol. 1,60)

Poŝtĝirkonto 3-7791 al : D.ro C.C.Ferrari

aŭ pĝk. al : 1-37638 - P.Giacinto Jacobitti

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo